




EKO 2021-04 sendita el Budapeŝto la 29an de januaro. Kontrolo el Benino.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 72 en Irano – la unua seminario de 2021

La unua seminario de Aktivula Maturigo por 2021 okazos en aprilo, inter la 8a kaj la 11a -- tiuj estas la datoj de la sekva Irana Kongreso. Decidota, ĉu la AMO-seminario daŭros unu tagon aŭ du tagojn kaj ĝiajn precizajn datojn. La titolo de la seminario estos 'Ŝtopi la digojn'. Tio referencas la nederlandan knabo-heroon Hans Brinker, kiu forlasis faman sket-konkurson, kiam li rimarkis truon en digo protektanta la apudan vilaĝon. Li per sia fingro ŝtopis truon ĝis venis la vilaĝanoj por ripari tiun digon.

La mesaĝo po ni? Ni devas trovi la truojn -- la malfortajn punktojn -- en nia agado kaj provi ŝtopi ilin. La baza tasko estas do identigi la malfortaĵojn de nia nuna movado -- precipe tiu rilate al niaj landaj kaj fakaj asocioj.

La maldekstra bildo montras la statuon pri la rakonto origine kreita por filmo sed poste starigita en la apudmara urbo Harlingen, en orienta Frislando. Submarnivelaj urboj en Nederlando, same kiel nia Esperanto-movado, devas zorge protekti sin de obstakloj kaj minacoj.

Sekvos detala enkonduko pretigita de la patro de AMO, por laŭregione trovi la malfortajn punktojn kaj la rimedojn je dispono por la digo-ŝtopado. Tiu prezentaĵo alvenos ĝustatempe por pretigi dezirantojn partopreni en la diskuto, kiu laŭ la kutimo, okazos pere de Zoom (Zomo).



.En postaj paĝoj: Institucio Hodler' 68 • Lernilo Marcek; • 50a UN-informilo • Afrika Bulteno • Goo.

Institucio Hodler'68 invitas proponojn

Rakoen Martens informas kaj alvokas.

Institucio Hodler '68. IH'68 estis starigita en 1968 omaĝe al la fondinto kaj unua granda mecenato de UEA, Hector Hodler. Ĝi akumulas kapitalon, kies renton ĝi uzas por apogi movadajn instancojn kaj projektojn. Por pliaj informoj pri la fondaĵo, bonvolu legi la Gazetaran Komunikon [N-ro 872](#) de UEA aŭ nian statuton ([EO](#) | [NL](#)).

Por 2021, ni volas sciigi vin ke, kiel individuo, grupo, klubo, aŭ asocio, vi rajtas peti subvenciojn ĉe ni por movadaj projektoj. Unuavice, niaj subvencioj helpu al UEA kaj la realigo de ĝia Laborplano. Tamen, kelkfoje ni subvencias projektojn ekster UEA, kiuj ekzemple grave kontribuas al la diskonigo de la temo Esperanto, al la instruado de la lingvo, aŭ al la kontaktoj inter Esperanto-organizaĵoj kaj ekstermovadaj ne-Esperanto-organizaĵoj.

Subvencipetojn vi povas fari per plenigado de [tiu ĉi formularo](#), kiun vi povas sendi al nia administranto Pasquale Zapelli <p.zapelli@co.uea.org>. En la subvencipetoj devas esti klare ke vi konstruas efikan projekton kaj kiel ekzakte la mono estos uzata. La estraro de IH'68 tralegos ĉiujn proponon kaj taksas la plej seriozajn kaj efikajn proponojn dum siaj estrarkunsidoj, kiuj okazas plurfoje jare (ne estas limdato por peti subvenciojn). Tamen sciu antaŭe, ke ni ne ofte aprobas subvenciojn, kaj la ŝanco estas malgranda, kiam ĝi estas projekto, kiu ne rekte rilatas al UEA.

Por pliaj informoj pri IH'68, ne hezitu kontakti la Estraron de IH'68:

S-ino Ans Bakker-ten Hagen <jeannette020@gmail.com>

S-ino Loes Demmendaal <l.a.demmendaal@planet.nl>

S-ro Rakoen Maertens <rakoen@maertens.international>

S-ro Bert de Wit <ajf.dewit@ziggo.nl>

Rakoen Maertens, Komitatano C de UEA, Estrarano IH'68

La Nov-Jorka Oficejo de UEA daŭre aktivas

[Informilo 50 – januaro-februaro 2021](#)

- UEA markis cent jarojn da kunlaboro kun internaciaj organizoj en decembro 2020
- Nia Informilo atingis sian kvindekan numeron
- Rezolucio alvokas al pli da multflankismo kaj atento al lingva politiko en UN
- La Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj emfazis la bezonon de pli bonaj rilatoj kun NRO-oj dum la pandemio
- UN-Tago 2020: "La mondo estas pli bona pro la ekzisto de UN, sed nesufiĉe pli bona."



Uzu la ligilon supre por aliri la version en Esperanto.

Afrikanaj temoj abundas

La 42-a numero de Esperanto en Afriko estas senpage elŝutebla per la jena ligilo:

<https://www.esperanto-afriko.org/Esperto%20en%20Afriko%20n-ro%2042.pdf>.

En tiu nova numero vi povas legi pri: Enkonduko (p.1), Informa agado de la Afrika Komisiono (p.1), KER-ekzamenoj unuafoje en Afriko (p.2), SEminario por Vlrinoj kun enkonduko al E-o en Benino (p.2), Uvira dankas siajn donacintojn... (p.3), John Magessa: mi agadis pro mia amo al Esperanto (p.3), Afriko kadre de la Monda Fest' 2020 de UEA (p.5), Libreto pri la Tago de Afriko (p.6), Grava atentigo el Niĝerio (p.6), Afrikanaj kunlaborantoj ĉe "Tutmondaj voĉoj" en Esperanto (p.7), Zamenhofa Tago en Rutshuru (p.7 – vidu la foton), ILEI kongresos en Benino (p.8) kaj Korespondpeto el Kongo (p.8).



Adjévi Adjé

Orienta strategio tutmondiĝas pere de Esperanto

Amiko kaj mi organizis internacian go-turniron en la interreto:



<https://www.dgob.de/wettbewerbe/end-polio-now>.

Ni ĝojas pri la granda nombro de partoprenantoj el la tuta mondo. Esperanto estas unu el la du turnirlingvoj (flanke de la angla) kaj ĉar ni decidis sendi ĉiujn mesaĝojn kaj komunikojn koncerne la turniron samtempe en la angla lingvo kaj Esperanto, ni tiel esperas daŭre varbi por nia lingvo inter granda rondo de ekstermovadaj go-entuziasmoj - sed, kompreneble: ankaŭ kelkaj membroj de la Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) partoprenas.

Christoph Klawe

Fizika libra instruilo en 45 lingvoj

'Esperanto per rekta metodo' estas pagebla lernilo, serioze multlingva.

La lernolibroj kostas same: 7,50 €. Ĉe la aŭtoro kun triona rabato ekde 3 ekz., ĉe UEA sesona rabato ekde 3 ekz., plus sendokostoj.

Eblas mendi ĉe la aŭtoro stano.marcek@gmail.com), aŭ ĉe **UEA-Libroservo** (138 titoloj): <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=&auxtoro=Stano+Mar%C4%8Dek&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>, kiel indikite en la afiŝo sekvapaĝe.

„Esperanto per rekta metodo“ en 45 lingvoj

Riĉe ilustrita lernolibro de Esperanto de Stano Marček, taŭga por kursoj kaj memlernantoj.

La lernolibro jam aperis en 45 lingvoj: la angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hinda, hispana, hungara, indonezia, internacia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, portugala (brazila), rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama.



La lernolibron akompanas didaktika materialo: Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (por instruistoj, 500 kartoj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – ankaŭ sur KD – por projekcii la bildojn); **KD Modela elparolo** en mp3 (voĉlegitaj Esperantaj tekstoj + la lernolibro en diversaj lingvoj en pdf); **Pekseso Esperanto** (kartludo, 12 volumoj kun 288 bildoj el la lernolibro); **Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto**, Fabeloj de Andersen kaj Grimm; 107 krucnigmoj en Esperanto; „Apo“ (aplik-aĵo) por telefonoj: <http://www.iei.nl/apo/> Pli da informoj ĉe: <http://katalogo.uea.org/> – aŭtoro nomo „Stano Marček“ (137 titoloj).



Esperanto-aŭskultejo de Stano Marček – libere elŝuteblaj sonlibroj kaj kantoj en Germana Esperanto-Biblioteko Aalen: t1p.de/auskultejo1

==== vortoj: 770 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@uea.net>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj**



**Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean**

